

- ★ Zamenhof-Jaro en Kubo 1-2
- ★ Patrolando estas homaro / 3
- ★ E en la centra regiono / 6-9
- ★ Potenca marŝado / 10
- ★ Monumente pri Zamenhof / 11
- ★ Oficiala informilo n-ro 4 / 12

Ekis la Zamenhof-Jaro

Kuba Esperanto-Asocio ekigis la Zamenhofan Tagon kaj Jaron per senvualigo de busto de D-ro L. L. Zamenhof ĉe la Nacia Sidejo de KEA, loko kiu konsistigas sidejon de Esperanto-Centro Havano, laŭ decido de la Nacia Estraro, ne en teorio, sed pro la karaktero de sia multjara instrua, eduka kaj kultura agado, krom oficeja centro de la kuba Esperanto-movado tutlanda. La prezidanto de KEA, Alberto Fernández-Calienes Barrios, en sia malferma parolado elstarigis la prifestatan jaron.

Estimados invitados, asociados y amigos:

Aún conmocionados por la partida física del Comandante en Jefe Fidel Castro, ferviente defensor y propulsor del Esperanto en Cuba, asumimos el reto que significa continuar sus ideas, siempre convencidos de que solo se logran los objetivos, cuando se trabaja en equipo, con inteligencia, firmeza, voluntad, espíritu de sacrificio, modestia y altruismo, entre otros principios fundamentales.

En ocasión del 75 Congreso Mundial de Esperanto, celebrado en La Habana en 1990, Fidel se declaró “soldado del Esperanto”, y expresó textualmente: “no se desanimen... su idea triunfará, porque es justa” y, ante una representación de los más de mil delegados reunidos en La Habana, sentenció: “Ustedes vinieron a Cuba a discutir en Esperanto la esperanza del mundo”.

Con esa idea de futuro, hoy, 15 de diciembre, la comunidad esperantista mundial evoca al iniciador del Esperanto, para celebrar, en el día de su nacimiento, el día del libro y de la cultura en esa lengua internacional. En esta ocasión, nos reunimos especialmente para inaugurar el Año Zamenhof, celebración acompañada por la UNESCO, según acuerdo de su Conferencia General en noviembre de 2015.

En la actualidad, muchos se preguntan cómo este idioma planeado logró sobrevivir los

avatares del tiempo, dos guerras mundiales y persecuciones, y evolucionar, aun frente a muchos otros proyectos de idioma internacional que se han quedado solo en propuestas.

La razón debemos buscarla, entonces, en su iniciador, el Dr. Lázaro Ludoviko Zamenhof, en sus altas aspiraciones y su valentía. Cumpliendo la sentencia de nuestro Apóstol José Martí, al afirmar que “Honrar honra”, celebramos hoy el aniversario 157 del nacimiento del iniciador del Esperanto, y nos acercamos a un hombre que, de manera admirable, logró aunar en sí mismo una gran valentía con la mayor modestia. Estas dos cualidades eran necesarias para que el Esperanto pudiera vivir y progresar.

Hombres como él y como Fidel han quedado en la historia, entre otras cosas, por su osadía, porque dedicaron su vida a defender un ideal y llevarlo a la práctica asumiendo con audacia cualquier reto por difícil que pareciera.

Hoy podemos afirmar que, precisamente, valentía fue lo que necesitó Zamenhof para salir al mundo con su propuesta lingüística, no temer a la burla y confiar en que los seres humanos se dispusieran a aprenderla y reconocieran la gran ventaja que brinda una lengua común, que permite la comunicación en plano de igualdad, entre personas de diferentes orígenes y culturas, sin discriminación y, por tanto, en condiciones justas.

Era necesaria, también, una gran modestia. Lo demuestra el hecho de que Zamenhof no quisiera aparecer como el creador de la lengua internacional, sino solo como su iniciador. O sea, tuvo la valentía y modestia suficientes para, de manera consciente y a sabiendas de que

se trataba de un fenómeno social, confiar el desarrollo y progreso de la lengua a la entonces incipiente comunidad esperantista y pidió que toda la autoridad correspondiera a una institución que los hablantes del Esperanto eligieran libremente.

► p. 2



Busto omaĝe al D-ro L. L. Zamenhof en la Esperanto-Centro Havano. Foto: Elio García Miranda.

► (daŭrigo el p. 1)

Hoy sabemos que, gracias a esta decisión, el Esperanto se desarrolló, no bajo los caprichos de su autor, ni detrás de un escritorio, sino que fue forjado por muchos, evolucionando de manera libre con el uso y aplicación, muy similar a lo que ha ocurrido con las lenguas naturales.

Zamenhof instó a sus primeros seguidores a que escribieran, tradujeran, y se propusieran tareas difíciles, pues solo así la lengua podría evolucionar. Y, gracias a eso, el idioma Esperanto —declarado patrimonio cultural inmaterial de Polonia— ha sobrevivido durante 130 años, posee hoy hablantes en más de 120 países, y goza del reconocimiento de organismos internacionales como la UNESCO.

La Asociación Cubana de Esperanto, continuadora de una tradición que comenzó en Cuba en 1904 —y entre cuyos pioneros tuvo a Don Fernando Ortiz—, mediante la enseñanza de este idioma internacional, se identifica con varios objetivos de la política cultural de nuestro país, como son: lograr un conocimiento más profundo de la lengua materna —signo más visible de nuestra identidad—, estimular en sus seguidores el hábito de leer, que aviva el contacto con el pensamiento y la cultura univer-



S-ro Adam Chrobot, Aferŝarĝito pri Politikaj kaj Ekonomiaj Aferoj de la Pola Ambassadejo en Havano, kaj Alberto Fernández-Calienes Barrios, Prezidanto de Kuba Esperanto-Asocio, senvualigas la buston de D-ro L. L. Zamenhof, iniciatinto de Esperanto. Foto: Elio García Miranda.

sales, defender la diversidad cultural y favorecer el uso sano del tiempo libre, a veces poco aprovechado en estos tiempos.

Inmersa en este universo de inquietudes, y para no olvidar la historia —como también nos enseñara Fidel—, nuestra Asociación se honra en develar el primer busto erigido al Dr. Zamenhof en Cuba, el cual, a partir

de hoy, pasa a engrosar la larga lista de monumentos existentes en el mundo dedicados al lingüista y oftalmólogo polaco.

Esta obra fue realizada por un colectivo de artistas integrado por los escultores José Antonio Hechavarría Rivas y Claudia Hechavarría Segura, y el diseñador Alberto Matamoros Núñez, a quienes expresamos nuestro

agradecimiento por hacer posible este proyecto, con el cual honramos al iniciador de la lengua internacional Esperanto e iniciamos oficialmente en Cuba el Año Zamenhof, acompañado por la UNESCO y coauspiciado por la Asociación Universal de Esperanto.

Muchas gracias a todos por su presencia.

El la zamenhofa “Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia”

La konata eseo de L. L. Zamenhof enhavas kernan idearon kies valideco iĝas evidenta en la nuntempaj bataloj de la internacia E-movado. Tial ĝi devus esti funde pristudata de tiuj kiuj nomas sin esperantistoj. Jen kelkaj ŝlosilaj fragmentoj de tiu grava dokumento.

“

Ĉiuj ideoj, kiuj estas ludontaj gravan rolon en la historio de la homaro, havas ĉiam tiun saman egalan sorton: kiam ili ekaperas, la samtempuloj renkontas ilin ne sole kun rimarkinde obstina malkonfido, sed eĉ kun ia neklarigebla malamikeco; la pioniroj de tiuj ĉi ideoj devas multe batali kaj multe suferi; oni rigardas ilin kiel homojn frenezajn, infane malsaĝajn, aŭ fine eĉ rekte kiel homojn tre malutilajn [...].

Sed pasas kelka tempo. Post longa vico da batalado kaj suferoj la “buboj-fantaziuloj” atingis la celon. La homaro fariĝis pli riĉa per unu nova grava akiro kaj eltiras el ĝi la plej vastan kaj diversforman utilon [...].

Al tiaj ideoj, kiuj al la samtempuloj ŝajnas senenhava fantazio kaj al la posteuloj ŝajnas tia natura afero, ke ili ne komprenas, kiamaniere la homoj miljarojn vivis sen ĝi, – al tiaj ideoj apartenas ankaŭ la ideo de enkonduko de komuna lingvo por la komunikiĝoj inter diversaj popoloj.

”



Patrolando estas homaro

Eni Marti

La 28-an de januaro, oni memoras en Kubo la naskiĝon de la Nacia Heroo José Martí en 1853, unu el la plej elstaraj filoj de Kubo ĉi-epoke, tial la Martí-Esperanto-klubo en nia lando ne volas preteratenti tiun ĉi novan datrevenon kaj volas dediĉieron de nia bulteno al la figuro de la apostolo kies idearo kaj humanisma agado daŭre validas en niaj agadoj.

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

Dezirante proksimiĝon al la figuro de José Martí, oni devas lin rigardi tra la prismo de la pensisto, artisto, organizanto kaj ŝtatisto kiaj li estis. Homo studema kaj agema kies ekzistopaŝojn gvidis profunda amo al sia patrolando kaj ties sendependiĝo. La 19-an de majo 1895 forpasis José Martí dum batalo fronte al la hispanaj trupoj.

La koncepto de Martí “patrolando estas homaro” estas fundamenta aspekto tre valida en la kuba nuntempo. Ĝi posedas kiel kerna elemento la difinon de Patrolando ne nur kiel fizika kaj kultura vasteco kiu koincidas kun la lando, sed ankaŭ la humanisma penso kiu trompis la tradiciajn limojn rilatajn al multaj aspektoj kiuj ĉirkaŭas homojn, kaj tial por Martí la patrolando preteriras geografiajn limojn. Li konsideris, ke la homoj devas prizorgi ĉion koncernan al la homa ekzisto.

Martí deklaris sian admiron pri la ideoj de Bolívar (Simón Bolívar) pri integriĝo de niaj landoj en unu solan patrolandon. Por li, integriĝo ne signifas perdon de identeco nacia, sed male, li firme kredis, ke defendo de nacia identeco permesus al la popoloj pli fundan interkonatiĝon por krei grandan familion; tiurilate li multe studis kaj verkis pri la diferencoj inter Norda Ameriko kaj Hispanameriko, kiun li nomis Nia Ameriko. Li estis konvinkita ke ekzistis multaj similecoj kaŭze de tre proksima historio, origino, evoluo, malamikoj komunaj, similaj kulturaj etapoj, kio inkluzivas komunan lingvon por granda plimulto de tiuj ĉi nacioj.

D-ro Carlos Palacio Fernández, studemulo pri la vivo de Martí, iam responde al demando pri la konata koncepto de Martí rilate al la Patrio, esprimis jenon: “La ampleksigo de la koncepto de Patrio farita de Martí al realo pli transcenda nepras por sukcesi en kiu ajn integriga projekto, kie integriĝo estu bazita sur kunlaboro”.

La esejo de Martí *Nia Ameriko*,* klare prezentas tiun ĉi ideon por transiri la mallarĝan koncepton pri patrio, kiu karakterizas la historion de la lastaj jarcentoj kiel esprimo de egoismo burĝa. En tiu teksto Martí taksas tiun ĉi sintenon vilaĝana kaj por ĝin superi alvokis la landojn interkonatiĝi por posta proksimiĝo kaj unuiĝo. Fakte, por Martí la patrolando etendiĝas kaj rompas la tradiciajn limojn.



XXV

Pensas mi, kiam mi ĝojas
Kvazaŭ lerneĵano simpla,
En la kanario flava,
Kies okulo tiom nigras!

Volas mi, kiam mi mortos,
Sen patri', ankaŭ sen mastro
Ekkuŝu sur mia tombo
Florbukedo – kaj la flago!

(El la poemkolekto
Simplaj Versoj)

* José Martí. *Nia Ameriko*, elhispanigis Orlando Raola, 2-a eldono, Monda Asembleo Socia (MAS), 2015, ISBN 978-2369600404.

Guantánamo: Zamenhofa tradicio

La plej orienta kuba provinco havas jaran eventon kun la celo omaĝi la iniciatinton de Esperanto: la Zamenhofa Metiejo, kiu ĉiujare okazas en decembro kaj ĉi-foje inter la 15-a kaj la 19-a de decembro ĝi arigis entute 31 geesperantistojn el la tuta lando.

Indas diri ke malgraŭ la damaĝoj suferitaj pro la uragano Matthew ĝuste en Baracoa, la planita sidejo, la loka E-Grupo ne rezignis pri ĝi, kaj tial estis elektita plian fojon la kampadejo Yacabo [jakabo] por okazigi la 21-an Zamenhofan Metiejon.

La 15-an de decembro tagmeze, Solvisión, la loka TV-stacio, elsendis intervjuon al estraranoj de la E-Grupo kaj poste, dum la Interkona Vespere, oni parolis pri la vivo de Zamenhof; la Estraro ankaŭ sendis gratulmesaĝojn al ĉiuj geesperantistoj kiuj esprimis zorgojn pri ni antaŭ kaj post la uragano. Indas menci, ke danke al la solidaremo de la esperantistoj, la Nacia Estraro de KEA povis sendi monkontribuon por la esperantistoj loĝantaj en Baracoa, viktimoj de la natura fenomeno kiu batis la regionon.

La vespera programo de la evento, inkluzivis artajn aranĝojn dum vendredo kaj sabato; oni deklamis poemojn, prezentis teatraĵon, kanzonojn kaj E-filmojn. Sabate postagmeze okazis aranĝo kun la infana grupo de la komunumo kiuj ekpartoprenis en la E-rondo; ankaŭ sukcesis telefona intervjuo kun ĵurnalistino de la radiostacio en municipo Imías.

Kune kun la adiaŭo, oni invitis al la venonta Zamenhofa Metiejo okazonta de la 14-a ĝis la 18-a de decembro 2017. Dankon al ĉiuj kiuj iamaniere kontribuis fizike kaj anime al tiu ĉi jara renkontiĝo!

LEONARDO LUNA NEYRA

Havananoj kaj Zamenhof-Tago

En la ĉefhalo de la Nacia Sidejo de Havano, tuj post la senvualigo de Zamenhof-busto ĉe la enirejo de la E-Centro, oni inaŭguris ekspozicion de libroj kaj fotoj en bela stando speciale dezajnita por la okazo, kun bildo de Zamenhof, vortoj pri Esperanto verkitaj de la elstara kubano D-ro Fernando Ortiz, plus la afiŝo de UEA por la ĉi-jara Zamenhofa tago. La aranĝon partoprenis ĵurnalistoj kaj amikoj de Esperanto en la ĉefurbo, kiuj informiĝis pri la agadoj de la Asocio.

Vespere okazis renkontiĝo, kiun partoprenis esperantistoj, kiuj kune legis poemon el libro de la sudafrika poeto Edwin de Kock kaj estiĝis debato pri la zamenhofa heredaĵo kaj la signifo de la slogano "Mi estas Esperanto". Vilhelmo Lutermano dediĉis specialajn parolojn al la ĵus forpasinta esperantistino Onoermis Acuña Velázquez, kiu dum la lastaj jaroj aktive rolis en la havana komunumo. Same estis dediĉitaj kondolencaj vortoj memore al Martín Castro López, tre aktiva membro de KEA dum la 80-90-aj jaroj.

Post vigla partopreno en la debato, la havanaj esperantistoj konfirmis la validecon de la idearo de internacia lingvo por justa komunikado kaj la rolo de ĉiu esperantisto mem agi laŭ la sinteno de doktoro Zamenhof: ĉiu homo kiu lernas kaj uzas Esperanton, fariĝu mem aganto por disvastigi ĝin kaj devas kunporti tiun senton de respondeco rilate al la IL.

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ





E-vespero en Granma

Okaze de la 153-a datreveno de la naskiĝtago de Zamenhof, la esperantistoj de la urbo Bayamo [bajamo], situanta en la orienta parto de la insulo, renkontiĝis en la sidejo de la filio ĉe la kulturdomo urba por festi la Zamenhof-tagon kaj okazigi kunsidon de la Klubo Martí-Zamenhof.

Frank Cedeño Estrada profitis la okazon por karmemora minuto da silento pro la forpaso de la historia gvidanto kuba Fidel Castro, kies favora sinteno al la IL estis siatempo montrita okaze de la 75-a UK en Kubo en 1990.

Sekve li legis salutmesaĝon okaze de la Tago de la Libro en Esperanto kaj legis la tekston “Fidel, soldato de Esperanto” sendita de Renato Corsetti.

Poste Cabrera legis mesaĝon sendita de Maritza Gutiérrez González al la kubaj esperantistoj pri la forpaso de Onoermis Acuña. Li parolis pri ŝi kiel speciala kaj elstara esperantistino. Ankaŭ li legis leteron senditan de hispana amiko kiuj petis zorgi la historion de la Revolucio kaj heredaĵon de nia lando.

Rafael Cabrera parolis pri la ideo de Oscar Asensio rilate al la E-flago dum publikaj aranĝoj, kiel ĉi-foje okazis dum la funebraĵoj de Fidel. Multaj homoj vidis ĝin en la Revolucia Placo de Havano per televidelsendo tutlanda kaj oni interparolis pri la signifo de la E-flago kaj Esperanto kiel fenestro al la mondo.

D-ro Wilfredo Díaz Hernández prelegis pri Martí kaj Zamenhof kiel homoj kiuj faris kaj konstruis ideojn por la estonteco.

Anyer Montero Ramos prelegis pri Esperanto en la mondo, kune kun centoj da lingvoj plej parolataj nuntempe en la planedo, kaj invitis la ĉeestantojn tosti okaze de la naskiĝtago de la kreinto de Esperanto. Poste li raportis pri la maniero elekti la partoprenantojn al KERo 2017.

FRANK CEDEÑO ESTRADA

22-jara Filio Santiago de Cuba

La 8-an de decembro 2016, la Provinca Filio de KEA en Santiago de Cuba, fariĝis 22-jara. La esperantistaro de Santiago festis la datrevenon en la provizora sidejo de la Filio. Ĝi estis bona okazo por bonveni samideanon Boris Arrate, loĝanta en Hungario kiu dume vizitis Kubon. Ĉiuj kunfestis, interbabilis, aŭskultis E-muzikon, manĝetis kaj tostis je la sano de nia movado. (Foto: Ernesto Jústiz).

GONZALO COLLANTES GARCÍA


Renkontiĝo en Santa Clara

En sabato, la 10-an de decembro 2016, je la 9-a atm, en ĝardeno José Martí ĉe Placo Ernesto Guevara [gevara] en Santa Clara, okazis renkontiĝo de la E-grupoj de Santo Domingo kaj Santa Clara, kune kun reprezentantoj de Placetos.

La ideoj, vivo kaj heredaĵoj de José Martí kaj Fidel Castro estis la ĉeftemo, pri kiu oni prezentis kelkajn kontribuojn. La partoprenintoj, kune kun la tieaj gelaboristoj kuntostis por la Zamenhofa Jaro 2017, kiam pluraj E-eventoj okazos en la teritorio.

JOSÉ LUIS MONTES DE OCA CÁRDENAS

Esperanto renaskiĝas en Villa Clara kun nova elano



Provinco kun pli ol centjara agado por Esperanto. Inter ĝiaj plej elstaraj figuroj, la klera Julio Jover Anido. Lulilo de la esperantisto kun plej longa movada vivo (1908-1968) kaj gvidanto de la movado en Kubo dum pli ol 60 jaroj: Antonio Alemán Ruiz. Malnovaj revoj konkretiĝas hodiaŭ en la Centra Universitato Marta Abreu de Las Villas. Novaj fortoj stafetas kaj reprezentas la esperon por la nuntempo kaj la estonteco.

JUAN R. RODRÍGUEZ GÓMEZ
ALBERTO F. CALIENES

Poŝtkarto de Zamenhof
subskribita en Varsovio
la 7-an de decembro 1909
sendita al Rafael Crespo Rangel
(Báez, Santa Clara).



Supre, s-ro Simo Milojević, Ĝenerala Direktoro de UEA, dum vizito al Santa Clara en 1986. Unua de maldekstre, Néstor Veitía, dekstre Porfirio Rodríguez. Malsupre s-ro Milojević alparolas la ĉeestantojn en la malfermo de la Esperanto-Konferenco dum la 3-a Internacia Librofoiro, (Kongresa Palaco, Havano, 1986). Fotoj: Arkivo de KEA.

La unuaj tempoj

Komence de la 20-a jarcento Esperanto montris unuajn vivsignojn en tiu teritorio per la agado de Rafael Crespo Rangel (vilaĝo Báez) – kiu korespondis kun L. L. Zamenhof kaj dank' al kiu Santa Clara iĝis konata en la tuta mondo – kaj Eduardo Francisco Rodríguez (Sagua la Grande). Ili estas inter la unuaj propagandistoj de la lingvo kaj kreskigis la movadon al i.a. Zulueta kaj Corralillo.

Tiam kaj ĝis 1940 la provinco nomiĝis Santa Clara kaj ĝia teritorio etendiĝis ĝis la nunaj Sancti Spíritus kaj Cienfuegos, kie ankaŭ oni fondis E-grupojn. La plej grava rezulto de tiuj agadoj estis la fondo de la E-Grupo en Santa Clara (1910) far Julio Jover Anido – estrarano de Societo Kuba por la Propagando de Esperanto (SKPE) kune kun Fernando Ortiz, Juan Miguel Dihigo kaj Antonio Alemán Ruiz –, kiu gvidis la E-grupon Club Escuela Esperantista de Santa Clara (7-a de aŭgusto 1910).

Post la fondo de KEA

Meze de la 80-aj jaroj, kiel parto de la tutlanda disvastiĝo de Esperanto, la movado en Villa Clara kaj ĉefe en ĝia ĉefurbo Santa Clara, estis unu el la plej fortaj en nia lando danke al la laboro de entuziasmaj esperantistoj sub la gvido de Néstor Pérez Veitía kaj Ana Dora Rodríguez Pérez, kiuj estris la Provincan Filion.

La plej bona rekono al la tiea laboro estis vizito en 1986 de s-ro Simo Milojević [milójevič], tiam Ĝenerala Direktoro de Universala Esperanto-Asocio (UEA), kiu vizitis Kubon laŭ invito de la Fremdlingva Eldonejo José Martí por partopreni la Internacian Li-

brofoiron Havano 86 kaj prezidi la E-Konferencon, kiun KEA organizis en la Kongresa Palaco.

Rezulto de tiu vizito estis la formala invito de KEA gastigi Universalan Kongreson (UK) de Esperanto, ideo kiu efektiviĝis per la 75-a UK (Kongresa Palaco, Havano, 14-21 julio 1990) post la 1-a Kongreso de KEA (Teatro Mella, Havano, 4-6 decembro 1987), la inaŭguro de la kurtondaj E-elsendoj en Radio Havano Kubo (11-a de septembro 1988) kaj la Internacia Konferenco por la Evoluo de Esperanto en Iberameriko Esperanto '88 (Kongresa Palaco, Havano, 28-30 novembro 1988).

Dum la 80-aj jaroj Esperanto trovis fekundan grundon en Santa Clara, Sagua la Grande, Santo Domingo, Cascajal, Manacas kaj Manicaragua. Signifoplenaj momentoj de tiu etapo estis la okazigo de la Komitatkunsido (unufoje ekster Havano, 1986) kaj la 1-a Nacia E-Festivalo (Santa Clara, 8-10 junio 1989) kaj la 2-a Festivalo (Santo Domingo, novembro de 1991), kie brilis la organiza talento de José Luis Montes de Oca Cárdenas.

La stafeton de la tiama movado ricevis en la 90-aj jaroj Porfirio Rodríguez, Oscar Valdés kaj José Luis Montes de Oca, kiu lasta aktive partoprenis en la kreado de la Centra Komisiono (strukturo kiun organizis la esperantistoj de Matanzas ĝis Camagüey por ĉefe subteni la kulture agadon de KEA) kiu sesis marte de 1999 en la Muzeo pri Dekoraciaj Artoj de Santa Clara. Ĝin partoprenis esperantistoj el Matanzas, Cienfuegos, Villa Clara, Sancti Spíritus, Ciego de Ávila kaj Camagüey plus la Nacia Estraro kaj s-ro Eddy Raats, el Belgio.



Maldekstre: Kunsido de la Centra Komisiono, marte de 1999 en Santa Clara, sub la gvido de Norberto Díaz Guevara kaj José Luis Montes de Oca Cárdenas. **Dekstre:** Partoprenintoj en la 18-a Komitatkunsido okazinta januare de 2001 en la hotelo Santa Clara Libre. Fotoj: Arkivo de KEA.

En la dua jarmilo

Januare de 2001 sesiis en hotelo Santa Clara Libre, loke organizita de Jesús Medrano Urquiza, la 18-a Komitatkunsido de KEA. Aliaj sesioj de la Nacia Komitato okazis en tiu provinco dum la Kubaj Esperanto-Renkontiĝoj (KERo) okazintaj en Río Seibabo, Manicaragua, 2012 kaj 2014) kaj eksterordinara (Arcoíris, Santa Clara, 2016).

Laŝtatempe ekaktivis Eddy Machado Hernández, nuna Delegito kaj komitatano de KEA en Santa Clara, kiu gvidas kaj kunordigas la agadon en la provinca ĉefurbo kaj kune kun Montes



de Oca celas reaktivigi la laboron en la tuta provinco por garanti la daŭripovon de la agado kaj atingi pli altajn ŝtupojn kiel meritas la pli ol 100-jara Esperanto-tradicio de tiu teritorio.

de Oca celas reaktivigi la laboron en la tuta provinco por garanti la daŭripovon de la agado kaj atingi pli altajn ŝtupojn kiel meritas la pli ol 100-jara Esperanto-tradicio de tiu teritorio.



Supre maldekstre: Grupa foto dum la 1-a KERo, okazinta februare de 2012 en Río Seibabo, Manicaragua. Foto: Arkivo de KEA. **Dekstre:** Norberto Díaz Guevara (Sancti Spiritus) dum la prezento de Esperanto al interesitoj en salono de la Komputika Junularklubo n-ro 1 en Santa Clara. **Mal-supre:** Renkontiĝo en la provinca ĉefurbo de la E-grupoj de Santa Clara kaj Santo Domingo ĉe Nadia Peeva Mitez; de maldekstre unue: José Luis Montes de Oca Cárdenas, Eddy Machado Hernández, Norberto Díaz Guevara, Ena González Machado, Manuel Antonio Fuentes Gary kaj Duniesky Aguilera Barrera. Due: Norberto, Nadia (gastigantino) kaj Ena. Fotoj: Leonides López Morales.



Maldekstre: Dum la Simpozio en la Havana Universitato (17 novembro 2015), i.a. d-rino Mercedes Garcés Pérez kaj mag. Yamilé Pérez García, profesorinoj de UCLV. Foto: Elio García Miranda. **Dekstre:** Surpodie, dum la prelego en UCLV (10 novembro 2016), mag. Eddy Machado Hernández, Alberto F. Calienes kaj Juan Ramón Rodríguez Gómez. Foto: Norberto Díaz Guevara.



Prelego pri Esperanto en la Centra Universitato Marta Abreu de Las Villas

La 17-an de novembro 2015, tuj antaŭ la okazigo de la 6-a Kongreso de KEA, sesiis en la Havana Universitato Internacia Simpozio “Esperanto: Lingvistika kaj socikultura fenomeno”, kun partopreno de fakuloj el diversaj institucioj kaj universitataj fakultatoj i.a. profesorinoj d-rino Mercedes Garcés Pérez kaj mag. Yamilé Pérez García, Fakoj pri Lingvistiko kaj Literaturo, Fakultato de Humanismaj Sciencoj, Centra Universitato Marta Abreu de Las Villas (UCLV).

Rezulte de la debatoj, ambaŭ profesorinoj montris sian interesiĝon kaj parolis pri la eblo organizi E-kurson en UCLV kun la celo iam proponi tie fakultativan aŭ postdiplomman kurson; ili mem volis tuj eklerni kaj tiucele estiĝis kontaktoj inter UCLV kaj KEA por organizi prelegon. Post longa korespondado, oni decidis prezenti Esperanton ne nur al la publiko en la provinca ĉefurbo, sed ankaŭ al la studentoj de UCLV.

KEA komisiis al Alberto F. Calienes, Juan Ramón Rodríguez kaj Norberto Díaz kunordigi kun nia Delegito en Santa Clara, Eddy Machado Hernández, kiu loke aranĝis la aferojn. Unue okazis inter-

vjuo en la provinca radiostacio CMHW, (<http://www.cmhw.cu/cultura/3616-promueven-en-villa-clara-la-ensenanza-del-esperanto>), kaj alia radioprogramo, rezulte de kiu, la 9-an de novembro kolektiĝis interesitoj pri Esperanto en ejo de la loka Komputika Junularklubo n-ro 1 (vd. p. 9).

Laŭprograme, la 10-an matene ni estis akceptitaj en UCLV kie oni interŝanĝis informojn pri la prelego kaj la celpubliko, ties interesiĝoj kaj motivoj. La prelego konsistis je tri partoj: La ideo pri la bezono de internacia neŭtrala lingvo (Alberto F. Calienes); Esperanto: gramatikaj aspektoj (Norberto Díaz Guevara) kaj Historio de Esperanto en Kubo 1904-2016 (Juan Ramón Rodríguez Gómez).


En la salono kolektiĝis ĉ. 50 gestudentoj interesitaj, kiuj ne nur atente aŭskultis la prelegon, sed ankaŭ starigis tre interesajn demandojn aŭ argumentis por kaj kontraŭ la ideo de IL.

Rezulte de la prelego, baldaŭ komenciĝos tie E-kurso sub la gvido de Norberto Díaz Guevara.

ALBERTO F. CALIENES kaj JUAN R. RODRÍGUEZ GÓMEZ



Maldekstre: Kvindeko da gestudentoj atente aŭskultas la prelegon pri Esperanto. Sur la foto, de maldekstre: Jesús Medrano Urquiza (malnova esperantisto de Santa Clara), studento kaj d-rino Madeleyne Bermúdez Sánchez, vicdekano de la Fakultato pri Humanismaj Sciencoj de UCLV. **Dekstre:** Alberto F. Calienes respondas al demandoj dum la interparolo kun la gestudentoj. Fotoj: Norberto Díaz Guevara.



Periódico digital de Ciego de Ávila

INVASOR

Portada Cuba Internacional **Cultura** Deporte Criterios Ciencia Sociedad Economía Provincias

Presentado en Ciego de Ávila libro sobre Esperanto

Ligilo al la reta eldono de Invasor (tiea provinca gazeto), kies direktoro, Roberto Carlos Delgado Burgos, instigis la publikigon de artikolo de Iraida María Hernández Prado kun fotoj de Alejandro García Sánchez pri la prezento de El Esperanto en Cuba (1904–1973) kun ties aŭtoro, Juan Ramón Rodríguez Gómez, la 12-an de novembro 2016, en salono de la sidejo de Unuiĝo de Kubaj Artistoj kaj Verkistoj (UNEAC). Al tiu artikolo reagis kelkaj legantoj. <<http://www.invasor.cu/cultura/11293-presentado-en-ciego-de-avila-libro-sobre-esperanto>>.

ALBERTO F. CALIENES
JUAN R. RODRÍGUEZ GÓMEZ

Tiu ĉi verko estas la unua alproksimiĝo scienc-metodologia al interesa lingva kaj kultura movado kiu disvolvis sian agadon en la lando dum pli ol 110 jaroj danke al miloj da sekvantoj de tiu ĉi lingvo diversepoke, inter kiuj elstaras kleraj personecoj kiaj Fernando Ortiz, Mariano Aramburo, Julio Jover, Juan M. Dihigo... Ĉi-volumo, eĉ se la faktoj respektas kronologian sekvon, la legantoj ne trovos nuran historian rakonton, sed interpreton, analizon, pritakson... fine, prikomentitan historion, surbaze de trovitaj dokumentoj, plejparte devenantaj el la unuaj jardekoj de la 20-a jarcento aŭ entute neeldonitaj ĝis hodiaŭ.



Januare de 1998 en hotelo Sierra Maestra, Bayamo, Granma, dum la 14-a Komitatkunsido de KEA. Sidantaj, tri Honoraj Membroj de KEA. De maldekstre, Pedro P. Lamas Díaz (1929–2014, al kiu la libro estas dediĉita), Rosa Castañeda Guerrero kaj Socorro Castro Acosta (1916–2008); starantaj malantaŭe, Maritza Gutiérrez González kaj Rafael Cabrera Espinosa. Foto: Juan Ramón Rodríguez Gómez.



Maldekstre: Libroprezento ĉe UNEAC en Ciego de Ávila. **Dekstre:** Malnovaj esperantistoj deziris konservi memoraĵojn de la prezento. Maldekstre de la aŭtoro, Berta María Quintero Rubio (vidvino de Pedro P. Lamas Díaz). Malantaŭe, de dekstre, Héctor Paz Alomar (ĵurnalisto), Ángel Cabrera Sánchez (urba historiisto), Iraida M. Hernández Prado, Haydée M. Rodríguez Cruz kaj Juana Ruiz Lamas. Fotoj: Alejandro García Sánchez.



SPORTO

Vivu 120 jarojn, malkovru la fonton de la eterna juneco! Potenca marŝado (angle: Power Walking)

FERNANDO A. PAREDES (Muroj)

La longaj sesioj en la gimnastikejo jam ne estas modo. Nun la modo estas praktiki mildan, sed efikan sporton. Ĉiuj povas praktiki potencon marŝadon aŭ simple marŝadon, kaj dikuloj, kaj maldikuloj, trejnataj aŭ ne. La marŝado zorgas pri la artikoj kaj ligamentoj kaj helpas perdi tiujn plusajn kilogramojn krom amuzi nin. Grave: kontrolu la ĝustan teknikon, la adekvatan ritmon kaj la optimuman pulson.

Marŝado anstataŭ trotado. La trotado aŭ kurado estas tre laciga kaj traŭmatiga. Krome la marŝado estas la natura movo de la

homo. Dum marŝado moviĝas 660 muskoloj kaj 206 ostoj. Ĝi estas bonega ekzerco por la koro, trejnita koro batas laŭ malalta frekvenco kaj pumpas pli da sango. Plibonigita kora aktiveco malgrandigas la infarkto-danĝeron kaj reguligas la altan sangopremon. Ĝi povas ankaŭ haltigi la osteoporozan procezon kiu komenciĝas post la 40-aj jaroj. Ankaŭ la marŝado estas bona por haltigi la varikojn, ĉar dum la movo de la kruroj, la sangocirkulado vigliĝas danke al la intensa movado de la krura muskolaro.

La riĉigita sango transportiĝas de la vejnoj ĝis la koro kaj eviteblas ke ĝi restu en la kruroj kaj formiĝu varikoj. Per la ĝusta spirado, ĝi pli oksigenas la sangon kaj stimulas ties cirkuladon. Per la trotado, kurado kaj aliaj tro fortaj ekzercoj (ne aerobiaj) oni

nur eliminis karbonhidratojn glukozforme. Per la potenca marŝado (kiu estas aerobia), oni eliminadas rekte lipidojn (grasojn) pro metabolismaj kaŭzoj, eĉ post kiam vi alvenas hejmen kaj sidas komforte tie rigardante televidon.

Oni ne bezonas specialan vestaĵon, ilojn nek sportejon, ĝi povas esti praktikata ĉie kaj dum ia ajn vetero. Bezonatas nur proksimume inter tridek kvin minutoj ĝis unu horo da praktikado kaj kiom da sano ĝi donas al vi!

Nur la uzataj ŝuoj devas esti konvenaj por la marŝado, ili devas esti tenisaj aŭ sportaj ŝuoj, sufiĉe fortaj, flekseblaj kaj leĝeraj. Grave! Ĉiam konsultu vian kuraciston antaŭ komenci la trejnadon.

Ek al la marŝado!

Bonajn piediradon kaj sanon!

Por ricevi la detalajn eksplikojn pri la trejnado, kontaktu la verkinton ĉe: fernandoandres@correodecuba.cu

Intervjuo al...

Graciela Morgado Rodríguez

Maritza: Estimataj geaŭskultantoj de Radio Havano Kubo, hodiaŭ mi havas la ĝojon paroli kun s-ino Graciela Morgado Rodríguez el la orienta regiono de Kubo, ĝuste el Contra-maestre, en provinco Santiago de Cuba. Hodiaŭ mi ŝatus paroli pri tiu ĉi alia projekto kies nomo estas Teamo Baĉata. Mi volas memori al vi, ke Graciela ankaŭ estas la dorsa spino de alia konata projekto tra la mondo, kiu estas la ensemblo Amindaj, sed ĉi-foje mi parolos pri Teamo Baĉata. Kion vi povas rakonti pri ĝi? Kiel ĝi estis kreita?

Graciela: Saluton Maritza! La projekto Teamo Baĉata estis fondita fine de 2013 de Graciela Morgado kaj kelkaj muzikistoj de la bando Amindaj kun la celo disvastigi Esperanton pere de latinamerikaj ritmoj kaj ni debutis dum la Kuba Esperanto-Renkontiĝo (KERo) 2014, okazinta en Viñales, Pinar del Río, kun tre bona akcepto de la publiko. Teamo Baĉata koncertas en diversaj scenejoj en mia municipo, partoprenis dum la 36-a kaj 37-a Datrevenoj de KEA okazintaj en mia provinco, Santiago de Kubo.

Fine de la pasinta jaro, ili sonregistris belan kanton esperante kaj hispane – verkintan de Jaime Ginarte, tre konata esperantis-

to en mia municipo, aŭtoro kaj komponisto – titolitan, esperante “Rava virino”, hispane “Mujer de fuego”. Kantas esperante Carlos Rafael Lolo Mendoza kaj hispane Miguel Ángel Sánchez Reyes.

Sekve ili sonregistris la trian kanzonon verkitan en Esperanto de sinjoro Roy McCoy – tre konata esperantisto el Usono/Nederlando – titolitan “Kara li”. Kantas Miguel Ángel Sánchez Reyes, ĉefa voĉo de la grupo. La tri kanzonoj estis sonregistritaj en la studio Junior de Contra-maestre.

La membroj de Teamo Baĉata estas Amilkar Fajardo, direktoro, marakoj kaj perkut-instrumentoj; Carlos Rafael Lolo Mendoza, muzikaranĝisto, treso kaj voĉo; Yoandris Baños Carrión, elektra kontrabaso; Salvador Gómez Parra, bongoj kaj kongao; kaj Miguel Ángel Sánchez Reyes, kantisto kaj ĉefa voĉo.

Mi esperas ke nia projekto kaj muziko plaĉu al vi. Mi invitas vin danci, kanti kaj ĝui nian muzikon. Ĝi estas donaco de Teamo Baĉata al nia esperantista komunumo; mia teama laboro estas por ĉiuj kiuj amas Esperanton en la mondo. Koran dankon!

Maritza: Karaj geamikoj ni parolis kun Graciela Morgado Rodríguez, ĝenerala reĝisorino de Teamo Baĉata kaj same kiel Amindaj estas bela kultura projekto kiu partoprenas en la kultura vivo de Contra-maestre, en Santiago de Kubo.

Intervjuis: MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ



Monumente pri Zamenhof: kontribuoj al la Esperanto-Jaro

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

La 18-an de novembro 2015, la 38-a Ĝenerala Konferenco de Unesko finis sian sesion en Parizo, okaze de la 70-jariĝo de tiu organizaĵo kaj la realigo de la Celaro 2030 por Daŭripova Evoluigo.

Por esperantistoj la plej ĝojiga decido de la Ĝenerala Konferenco estis la envicigo de la 100-a datreveno de la morto de L. L. Zamenhof (14-a de aprilo 2017) inter 53 datrevenoj kun kiuj Unesko estos "asociita" en la periodo 2016-2017. Propono pri tio estis farita de Pollando, kun subteno de Germanio kaj Slovakio. Temas pri plia rekono de Unesko al Zamenhof post tiu okaze de la 100-a datreveno de lia naskiĝo, kiam li estis proklamita unu el la grandaj personecoj de la homaro.

Lige al tiu ĉi celebrado, UEA alvokis la landajn asociojn kunfesti la Zamenhofan jaron per vasta programo de diversaj aranĝoj ekde la 15-a de decembro 2016 ĝis sama dato de 2017. Komisiito pri la jaro estas s-ino Barbara Pietrzak, eksa estrarano de UEA kaj estro de la esperantlingva podkasto de la polaj radioelsendoj; ankaŭ d-ro Mark Fettes, prezidanto de UEA kaj aliaj du estraranoj prizorgas la celebradon.

Ĝuste tial, KEA meminiacie entreprenis programon por festi la Zamenhof-Jaron kiu komenciĝis la 15-an de decembro per inaŭguro de nova Zamenhof/Esperanto-Objekto (ZEO) en Kubo, tio estas, en Havano. Kompreneble, temas pri salutinda evento kiu certe ankaŭ aliaj landaj asocioj mem entreprenos.



Ĉi-momente ankoraŭ ni ne scias pri la konkreta plano de la Estraro de UEA rilate la Zamenhof-jaron, sed ĝi lanĉis alvokon pri retejo kiu disvastigos la Zamenhofan pensadon kaj agadojn. Ĉiukaze en Kubo jam oni laboras por bone omaĝi la iniciatinton de Esperanto tra la tuta lando.

Lige al Zamenhof kaj manieroj celebri la Zamenhof-Jaron, ni iom traserĉis en libroj pri la historio de E-monumentoj kaj certe rekomendindas tiurilate la libro *Monumente pri Esperanto* verkita de Hugo Rollinger, ilustrita dokumentaro pri 1044 Zamenhof/Esperanto-Objektoj en 54 Landoj de la kvin Kontinentoj. Cent jaroj da stratoj, placoj, monumentoj, bustoj, kulturcentroj, tabuloj, parkoj, pontoj, asteroidoj k.a., tio estas, en la periodo inter 1896 kaj 1996. La libron eldonis Universala Esperanto-Asocio kun la subteno de FAME-Fondaĵo por stimulado de internaciaj kompreniloj, Instituto Hodler '68, s-ro Adamo Goraliski Pawlikovski, kaj s-ro Heinz Schindler. Ĝin redaktis s-ro Thomas Bormann.


En la antaŭparolo, la aŭtoro, Hugo Rollinger, Honora Membro de UEA kaj de Germana Esperanto-Asocio, komentas ke origine, t.e. dum la unua duono de la 30-aj jaroj de sia kompilado, li nur intencis daŭrigi la registradon de ZEOj en formo de nuraj tekstaj listoj tiel kiel ĝis 1964 publikigis la Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) de UEA cele al varba kaj instiga informado.

Kune kun informoj pri ne jam registritaj aŭ nove inaŭguritaj objektoj li ricevis tiom bonajn fotojn, ke ne estus ĝentile simple ilin ignori, asertis la aŭtoro. Tute male, tiuj unikaj kaj historie valoraj fotoj fariĝis integra parto de la dokumentaro.

Kaj fakte, la dokumentaro entenas multajn ĝis tiam ne publikigitajn faktojn pri pluraj rimarkindaj objektoj, ekzemple, la evidente unua ZEO inter ĉiuj aliaj, laŭ ĝistiamaj esploroj, estis la ŝipo "Esperanto", konstruita kaj ennavigaciita antaŭ precize cent jaroj, tio estis, en 1896 en Hispanio, do nur naŭ jarojn post apero de Esperanto.

Sendube tiu ĉi interesa libro *Monumente pri Esperanto* entenas vere historian dokumentaron pri kiu ni devos informiĝi, kaj ankaŭ iel kontribui al pliriĉigo de la E-objektoj tra la mondo, des pli en la nuna tempo kiam ni prifestas la Zamenhof-Jaron, oportuna momento por diversigi nian kulturan kontribuon al diskonigo de Zamenhof kaj lia verkaro, kies ĉefa kontribuo estas la Internacia Lingvo Esperanto. Ni rekomendas vin ree foliumi tiun ĉi utilan dokumentaron.

NEKROLOGOJ



Onoermis Acuña Velázquez (Contra-maestre, Santiago de Cuba, 1971-09-17, bibliotekistino) forpasis la 11-an de decembro 2016. Ŝi eklernis Esperanton en 1995 per koresponda kurso en Santiago de Cuba. Dum 15 jaroj ŝi estis sekretariino de la E-grupo Contra-maestre. En 2012 ŝi elektiĝis estrarano pri Kulturo de la Provinca Filio de KEA en Santiago de Cuba.

Dum 18 jaroj en la movado ŝi laboris por kelkaj aranĝoj kaj ankaŭ prezentis kontribuojn dum la Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (SAEST) en 1997; laboris en la Internacia Librofoiro en februaro de la jaro 1998; helpis en la 1-a Infanfestivalo okazinta en Guantánamo, julie de tiu jaro; helpis organizi la 2-an Kulturan Festivalon dum novembro (1998, Santiago de Cuba); partoprenis en la 2-a Nacia Instruista Seminario (2004, Santiago de Cuba); kunorganizis Nacian Renkontiĝon en la kampadejo Las Golondrinas (Contra-maestre, 2005). En 2013 ŝi translokiĝis al Havano, kie multe laboris por reorganizi la agadon kaj mem kandidatiĝis por la prezidanteco de tiu Provinca Filio de KEA.



Martín Castro López (Havano, 1954-11-11, arkitekto) forpasis en Havano la 11-an de decembro 2016. Li eklernis Esperanton septembre de 1979 kaj ekinstruis la lingvon en 1981. Li laboris en la fako Kulturo ĉe la Nacia Estraro ĝis 1983, kiam li elektiĝis estrarano ĝis 1994. Kunordiganto de la E-konferenco dum la Librofoiro Havano '86. LKK-ano de la 1-a Kongreso de KEA. Respondecis pri kulturaj aranĝoj dum la Konferenco Esperanto '88. Kongresano kaj reprezentanto de kubaj artistoj dum la 73-a UK (Roterdamo, 1988). LKK-ano pri Artaj Aranĝoj dum la 75-a UK (Havano, 1990). Prelegis dum la 1-a Tutlanda Seminario pri Informado (junio, 1992), la 1-a Seminario pri Instruado (junio, 1993) kaj Expolingva '93.

INFORMILO n-ro 4 DE LA NACIA SIDEJO (ĝis 2016-12-31, CUP)

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 2016 (59)

★ **La Habana (36):** Ángela María Pedroso Cuesta, Onoermis Acuña Velázquez, Alberto Rodríguez Pineda, Noel González Fernández, Luis Enrique Rizo García, Oscar Asensio Pisciotta, Yordán Fonseca Olivera, Marta Eugenia Alonso Gutiérrez, Ismary Lezcano García, Digna Mayra Morales Burón, Alberto Fernández-Calienes Barrios, Javier Ramos Nistal, Olga Lidia Barrios Cunningham, María Antonia Cartaya Martínez, José Luis Hernández Carvajal, Miguel Ángel González Alfonso, Daimi Doval Delsa, José Cárdenas Zúñiga, Juan Carlos Montero Medina, Vilhelmo Lutermano, Julián Hernández Angulo, Magaly Valdés Serrú, Elmer Lores Matos, Pedro Fernández Rodríguez, Maritza Gutiérrez González, Ariadna García Gutiérrez, Alejandro García Acosta, Frank González González, Geomar Martínez Pérez, Mabel Blanco de la Cruz, Héctor Jiménez Batista, Blanca Julia Gómez, Juan Ramón Rodríguez Gómez, Alina Miranda Busutil, Teresa Cepero Tejera, Ariel Lima Pérez.
★ **Mayabeque (1):** Yunior Benítez Alonso.

★ **Villa Clara (6):** José Luis Montes de Oca Cárdenas, Julio César Díaz Casañas, Leonides López Morales, Yusimith Barrera Camacho, Eddy Machado Hernández, Raicel García Pérez.
★ **Sancti Spíritus (1):** Yoandra Rodríguez Labrada.
★ **Ciego de Ávila (1):** Amparado Cisnero Rovira.
★ **Santiago de Cuba (6):** Julio César Tamayo Salas, Pablo Cabrera Toledano, Guillermo Navarro Toledano, Carlos R. Lolo Mendoza, Francés Guibert Sorzano, Leonel Pestana Preval.
★ **Guantánamo (8):** Leonardo Luna Neyra, Tania Laurencio Molina, Tirso Ávila Bory, Asiel Torres Laurencio, Iliagne Torres Jardines, Gertrudis Lahera Rojas, Roberto Cutiño Palau, María Lisandra González Hurtado.

DONACIOJ
★ **Martí-Klubo (480.00):** Vilhelmo Lutermano (480.00);
★ **Kuba Esperantista Junulara Organizo (384.00):** Vilhelmo Lutermano (384.00);
★ **Fonduso Instruado (2 159.00):** Alberto Fernández-Calienes Barrios (48.00), Diana González Padilla (192.00), Alberto Rodríguez Pineda (480.00), Ángela María Pedroso Cuesta (196.00), Magaly Val-

dés Serrú (192.00), Reina Doncel Meneses (192.00), Javier Ramos Nistal (120.00), George León Rodríguez (120.00), Joan Fernández Valentín (120.00), María Antonia Cartaya Martínez (120.00), María de los Á. López Báez (192.00), Olga Lidia Barrios Cunningham (50.00), Alejandro Cedeño Mon (240.00), Damaris Hernández García (192.00).
★ **Ĝenerala Kaso (258.00):** Yunior Benítez Alonso (25.00), Aŭkcio en Havano okaze de la 37-a Datreveno de KEA (233.00).
★ **Fonduso Solidareco (3 720.00):** Vilhelmo Lutermano (1 200.00), Reina Doncel Meneses (120.00), María de los Ángeles López Báez (120.00), Gisela Docampo Alba (120.00), Magaly Valdés Serrú (120.00), Juan Ramón Rodríguez Gómez (120.00), Diana González Padilla (120.00), Julián Hernández Angulo (120.00), Damaris Hernández García (120.00), Alberto Rodríguez Pineda (1 440.00), Alberto Fernández-Calienes Barrios (120.00).
Elpagoj: a) Al Onoermis Acuña Velázquez (†) kaj familio dum ŝia enhospitaliĝo (1 680.00); b) Al damaĝitoj de uragano Matthew en Baracoa laŭpete de MG Guantánamo: (1 000.00).
Saldo: (1 040.00).
Al ĉiuj donacintoj KEA tre kore dankas.

Kuba Esperanto-Asocio
Apartado 5120, 10500 La Habana, Cuba
+53 7 640 4484
info@esperanto.cu.cu
www.esperanto.cu/cu



6-a Kuba Esperanto-Renkontiĝo 2017
33-a Komitatkunsido
Kampadejo Río Seibabo
Manicaragua, Villa Clara
15-19 marto 2017

**Amika voĉo el Kubo,
Libera
Teritorio en
Ameriko**

www.radiohc.cu/eo

RADIO HAVANO KUBO

Kurtondaj kaj retaj elsendoj en Esperanto

Nun ankaŭ en FM!

